



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 43** • AMO 100 • Deklaroj • Edukado, Scienco en UK < aŭgusto 7

## AMO 100 – planoj por la jubilea seminario

Nia jubilea seminario okazos iom frue en 2023. Ne tro fruas plani por tio!

La subaj ideoj por ege vasta temo delonge iris al la AMO-komisiono por komentoj kaj diskutado. Jen la proponata temo:

### 'Esperanto aganta en la 21a jarcento'

Do, klare antaŭen-rigarda temo - kiel ni planu pozitive kaj decide kontribui al la estonto? Tio postulos por la kontribuantoj la tiel-nomatan 'blu-ĉielan pensadon'; tio estas plene freŝa aliro al la temaro.

Proponite aliri la temon sub ses gravaj subtemoj; ne tro multaj sed kovrantaj multon:

- Kulture, literature
- Organize, lande
- Interes-teme, fake
- Renkontiĝe, kongrese
- Komunike, mesaĝe

Poste, la patro de AMO donos pli da indikoj por ĉiu ero, prepare al la publika peto por kontribuadoj. Ni bezonos simbolon por la centa seminario (propono apude) kaj espereble iun retejon. Gravas sekurigi kaj aperigi kiom eble da kontribuadoj eĉ antaŭ la seminario. Espereble kun diskutejo aŭ forumo.

Espereble, tiu seminario estos hibrida – rete sed ankaŭ kun fizika partoprenantaro.

Mia unua deziro estas, ke tiu seminario okazu en Hungario, la lando, kie okazis la unua seminario en marto 2014, antaŭ ok jaroj. Ĝi okazu minimume ie en ĉi tiu regiono, kie hungaroj povos eble vojaĝi kaj partopreni.

Pleje gravas la arigo de multaj valoraj kontribuoj, el kiel eble plej da mondpartoj kaj perspektivoj.



SMG, propono lanĉita en junio 16, 2022

## Kvin deklaroj pri Ukrainio

Gravaj instancoj de nia movado sentis la bezonon pretigi deklarojn pri la eŭropa malpaco: unuafoje la redaktoro de EKO vidis tian bonan kolekton da deklaroj, prezentitan en la bonaspekta, presita revuo 'Israela Esperantisto' en ĝia numero 173. Tiun revuon pruntis al mi en Klajpeda Mikaelo Lineckij, kiu nun redaktas la revuon. Kiam mi konstatis la valoron de la enhavo, mi rapide venis al demokrata decido, post vastgama konsultado kun mi mem, ne redoni ĝin.

La kvin instancoj en la EKO-vico estas UEA/ILEI (kuna deklaro), TEJO, SAT kaj IJEA – la faka asocio en UEA pri juroj, kaj laste ELI, la israela LA de UEA, en kies bulteno aperis la kolekto. La plena deklaro de UEA kaj ILEI aperas retej, sed mi ne kapablas trovi ilin. Ili estas zorge formulita laŭ la neŭtralecaj postuloj en la Statuto de la Asocio, al kiuj ILEI ene de horoj aligis sin.

**EI la deklaro de TEJO:** 'Kiel organizo dediĉita al libereco kaj al respekto de homaj rajtoj, TEJO kondamnas la invadon de Ukrainio.'

**EI la deklaro de SAT:** 'Ni kondamnas la teruran agreson de la nuntempa registaro en Rusio kontraŭ la ukraina popolo.'. La SAT-kongreso en Moskvo estas nuligita.

**EI la deklaro de IJEA (la jurista faka asocio):** 'IJEA [...] ne prenas politikajn poziciojn, tamen [...] ne temas pri politika disputo, sed pri milit-agreso tute kontraŭa al la Internacia Juro.'

**EI la deklaro de ELI (la israela landa asocio):** 'Laŭ sia heredo, kaj historie kaj kulture, Israelo estas forte ligita al kaj Ukrainio kaj Rusio. Multaj israelanoj, kiel novaj kaj malnovaj enmigrintoj havas familianojn en ambaŭ landoj. Tial, la tre bedaŭinda milito en Ukrainio tuŝas kaj malfeliĉigas multajn el ni persone.'

## Esperanto por Interkultura Komunikado

1. Temas pri kunveno pri kulturo kaj komunikado, ĉefe interkultura, kies celo estas kolekti ideojn pri la temo kaj montri Esperanton funkcia al ne-esperantistoj.
2. Se en via urbo aŭ lando vi sukcesas kunmeti teameton da esperantistoj, kiuj volas okupiĝi pri aranĝado de ĉi tiu kunveno, ni petas vin aranĝi ĝin por viaj samurbanoj, samlandanoj, prefere ne-esperantistoj, kiuj interesiĝas diskuti pri la temo 'Interkultura komunikado'. Povas temi pri lingva justeco, hegemonioj, edukado en plurkultura etoso, internaciaj renkontiĝoj ktp.
3. La kongreso okazu en la lingvoj, kiujn la partoprenantoj ŝatas uzi kun traduko al via nacia lingvo aŭ al Esperanto.
4. IKIKO estas monda, reta kunveno de la lokaj/naciaj kunvenoj, kiu okazos inter la **8-a kaj la 12-a de novembro** 2022. Oni provos konekti reprezentantojn el la pluraj kunvenoj por interŝanĝi la ideojn aperintajn en la lokaj, naciaj kongresoj en Esperanto. Ankaŭ la partoprenintoj de la lokaj kaj naciaj kunvenoj rajtos ĉeesti kaj sperti la egalecan funkciadon de Esperanto kiel komuna lingvo. Pro tio en ĉiu kunveno devas esti almenaŭ unu esperantisto, kiu povas traduki.
5. Oni povas kontribui al la diskuto per rekta alparolo, per skribita teksto ankaŭ scienca, per filmeto, per kanto ktp. Ĉiuj materialoj aperos en revuo aŭ estos gardataj en reta paĝaro.

Nun ekzistas kunven-organizantoj en Ĉilio, Kolombio, Meksiko, Hispanio, Francio, Germanio kaj Irano. Kaj ni traktas kun organizantoj en Usono, Tanzanio kaj DR

Kongo. La plimulto el la partoprenontoj scias nenion pri Esperanto. Ili renkontas la lingvon survoje, samtempe malkovras ĝian nehegemonian realan valoron.

Se vi scivolemas, skribu al [viko@civencia.io](mailto:viko@civencia.io) kaj ni gvidos vin partopreni en via lando.

Resumo kaj peto por partopreno: <https://ikiko.civencia.io/>

Viko estas konata, aktiva esperantisto en Hispanio

## Francoj eluzis la Esperanto-Tagon

Vidbenda prezentaĵo el la 26-a de julio kun la temo 'Esperanto, lingvo danĝera, antaŭe kaj nun' (*L'espéranto, langue dangereuse autrefois et actuellement*) videblas per Jutubo en la kanalo de EDE-France.. La prezentaĵo estas en la franca lingvo.

Adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=ld5INEIOhxl>

Pierre Dieumegard <[pierre.dieumegard@free.fr](mailto:pierre.dieumegard@free.fr)>

## Nova kurso en grava korea havenurbo

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto-kurso en KTC (Dumviva Edukejo de Busan)

Gvidantonomo: Inhye Gim (Ella)

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Busan, Korea Respubliko.

Aldoninto: kih4860

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27435>

## Edukado dum la UK

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj.

Titolo: Agado de Edukado.net dum la UK en Montrealo

Kategorio: Laste ĉe edukado

Post kelkaj tagoj komenciĝos la 107a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado. En la novaĵo vi povas legi kiel [edukado.net](http://edukado.net) kontribuos al la kongresaj programoj, kie kaj kiam eblos vidi nin, partopreni niajn aktivaĵojn. Bonan kongresumadon al ĉiuj! Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=874>

## Scienco dum la UK

Sabate vespere komenciĝos la UK en Montrealo. La tuta scienca programo estos hibrida, t.e. eĉ se vi ne ĉeestas, vi povos sekvi parton de la kongreso per la kutima Zoom-ĉambro. La prelegoj de la Intenacia Kongresa Universitato kaj Sciencia Kafejo estos vive transsendataj, eventuale eĉ eblos demandoj fine de la prelegoj. Laŭplane la prelegoj ankaŭ estos registrataj. Konciza programo de IKU troviĝas ĉi-sube, detale ĝi aperas en la kongresa libro <https://uea.org/kongresoj/UK/2022>.

La loka tempo de la kongresa programo estas UTC-4, kaj IST-7 (nome 13:00 en Montrealo estas 20:00 Israela Somera Tempo).

## Konciza scienca programo (laŭ la loka tempo)

**Dimanĉe 7.8:** IKU-inaŭguro (13:00), IKU1-Wandel (13:30) IKU2-Maja (14:45)

**Lunde 8.8** IKU3 Raola (10:45)

**Marde 9.8** IKU1-2 Wandel (10:45), IKU2-2 Maja (12:00), **Scienca Kafejo1** (4 prelegoj, 9:00-11:00)

**Ĵaŭde 11.8** IKU4 Madella (10:30), IKU3-2 Raola (12:00), **Scienca Kafejo2** (4 prelegoj, 13:00-15:00)

**Vendrede 12.8** IKU5 Mak (12:30), IKU6 Suzuki (13:45), IKU7 Sayadpour (16:30), Scienca Forumo (15:00)

La Zoom-ĉambro estos nia kutima: <https://huji.zoom.us/j/7508982919>

Amri Wandel

## Pli da poezio el Ĉinio

Ni alkroĉas la plej freŝan kajeron: 'Penseo 370'. Plezuro por poemaj amantoj. Pluraj el la numeroj de 'Penseo' disiris kun antaŭaj EKO-komunikoj.

## La Esperanto-Tago lasas posteĥojn

La 26an de julio en la TV-programo de «Don 24» estis intervjueto (ĉ. 8-minuta) kun Aleksandro Melnikov el Rostov-Don okaze de la Esperanto-Tago.

## Financa helpo por Madagaskaro

Por printigi kaj fotokopii la testfoliojn por la sesio de lingvoekzameno en aŭgusto 2022, Itaosy Esperanto-Klubo (IEK) ricevis financon de la UEA-programo «Ni semas». Tiu programo estas nun plene en la manoj de la Afrika Komisiono de UEA.

Henriël Fidalalao Firaisana <[henrieldredtv@gmail.com](mailto:henrieldredtv@gmail.com)>

===== vortoj: 1225=====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.